

BIBLIOTEKO
Hector Hodler
6.40

LA PARABOLO DE LA CISTERNO



LIBERA TRADUKO
EL LA LIBRO DE
EDWARD BELLAMY
„EQUALITY”
(„EGALECO”)

FILANTROPIO.....!

INTERNACIA ASOCIO BELLAMY
(Centro por Internacia Propagando)
Sokr.: Kerkweg 152, Santpoort (Nederlando).

ÖNB



+Z302703202

LA

la
ekz
log
akv
en
mat
per
gin

tis
bon
is
ali
ke
pos
tri
is
ant
igu
ekt
far
kaj
ni

LA PARABOLO DE LA CISTERNO.

Antaŭ tre longa tempo, kiam la homoj ne jam havis maŝinojn, ekzistis tre seka lando, kies enloĝantoj havis grandan bezonon je akvo. Ilia ĉefa tasko konsistis en tio, ke ili serĉis akvon de la mateno ĝis la vespero kaj multaj pereis, ĉar ili ne povis trovi ĝin.

Tamen en tiu lando ankaŭ estis kelkaj homoj, kiuj estis pli bonŝancaj ol la aliaj kaj sukcesis akiri provizon de akvo, dum aliaj trovis nenion. Tiel okazis ke ĉi-lastaj venis al la fortunaj posedantoj kaj petis ke ili povu trinki de la akvo, ĉar ili suferis grandan mizeron. Sed la posedantoj respondis: "Kial ni trinkigus vin de la akvo, kiun ni kolektis kun granda peno? Tiam ni fariĝus samtiel mizeraj kiel vi kaj pereus kun vi. Sed jen, kion ni volas fari por vi. Estu niaj

servantoj kaj kiel rekompenco ni donos al vi iom da nia akvoprovizo."

Kaj la popolo diris: "Donu al ni trinkaĵojn kaj ni estos viaj servantoj, ni kaj niaj idoj."

Kaj tiel okazis.

La posedantoj estis prudentaj viroj, kiuj sciis tiri profiton el la bonŝanca pozicio en kiu ili troviĝis. Ili dividis la popolon, kiu servis ilin, en trupoj sub la komando de estroj kaj sendis kelkajn al la fontoj por ĉerpi; aliajn ili igis porti la akvon kaj ankoraŭ aliajn ili igis serĉi novajn fontojn. Ĉiu akvo estis kolektata en unu loko kaj tie la posedantoj konstruigis grandan cisternon por konservi la akvon kaj tiun akvuĵon ili nomis ...la Merkato! Ĉi tie devis veni la servantoj de la posedantoj por ricevi la akvon, kiun ili bezonis por siaj familioj.

Kaj la posedantoj diris al

ni
ovi-
nu
viaj
en-
fi-
kiu
co-
poj
sen-
er-
k-
s
j
la
s
n-
ili
l

la popolo:

"Por ĉiu sitelo da akvo, kiun vi portos al ni, ni donos al vi po unu pencon kaj por ĉiu sitelo da akvo, kiun ni ĉerpos el la cisterno, ke vi povu trinki, vi kaj viaj edzinoj kaj infanoj, vi donos al ni po du pencojn. Kaj la diferenco estos nia profito, ĉar ni ne farus ĉi-ĉion por vi, se ne estus pro tiu profito, kaj tiam vi devus pereii pro soifo!"

Vi vidas ke la fortunaj posedantoj multe superis sian generacion per komerca kono kaj tial do ili estis alte laŭdataj, eĉ de tiuj kiuj devis doni po 2 pencojn por ĉiu sitelo da akvo kiun ili bezonis por sia familio, kvankam ili mem nur ricevis po unu pencon por ĉiu sitelo kiun ili verŝis en la cisternon! Kaj tiel estis bone en la okuloj de la servantoj, ĉar ili havis malviglan intelekton, kaj ili diligente alportis akvon en la cisternon dum multaj tagoj.


Sed -- post kelka tempo la cisterno, kiu nomiĝis Merkato, estis plenplena kaj la akvo transbordiĝis, ĉar por ĉiu sitelo kiun la akvoportistoj elverŝis en la ujon, ili retroricevis nur tiom, ke ili povis aĉeti nur duonan sitelon da akvo, kaj pro la surpluso kiu restis en la cisterno, ĉi-tiu baldaŭ tropleniĝis, ĉar da portistoj estis multe, da posedantoj nur malmulte kaj ĉi tiuj ne povis trinki pli ol la aliaj.

Tiel okazis, ke la cisterno estis plenplena!

Kiam la posedantoj vidis tion, ili diris al la popolo: "Vi vidas, ke la akvujo, kiu nomiĝas Merkato, estas troplena! Ni do provizore ne plu bezonas viajn servojn. Do sidiĝu kaj atendu pacience ĝis kiam la cisterno ree estos malplena; ni tiam redungos vin."

Sed kiam la popolo ne plu ricevis pencojn de la posedantoj,

LA MERKATO



Ĝi ne plu povis aĉeti akvon, ĉar ĝi ne posedis ion por pagi!

La posedantoj maltrankviliĝis, vidante, ke ili ne plu ricevis profiton, ĉar neniu aĉetis akvon de ili. Kaj al la grandaj vojoj ili dissendis virojn, kiuj devis laŭtvoĉe krii: "Ĉiu kiu soifas venu al la cisterno kaj aĉetu akvon de ni; estas sufiĉa provizo!"

"Ĉar", diris la posedantoj unu al la alia, "vidu, la tempoj estas malbonaj, ni devas reklami!" Sed kiel la popolo povus aĉeti, ĉar ĝi ja estis senlabora kaj ne posedis pencojn por akiri sitelon da akvo? Ĝi estis kondamnita al soifo.....

Kaj la homoj parolis pri ĉiaferoj kaj diris: estas krizo. Kaj la soifo de la popolo estis granda, ĉar nun ne plu estis kiel en la tagoj de la prapatroj, kiam la lando estis malferma, ke ĉiu serĉu akvon por si mem; la posedantoj estis uzurpintaj ĉiujn fon-

tojn kaj ĉiujn putojn kaj akvo-
provizojn, por ke neniu povu ek-
havi akvon, se ne el la cisterno,
kiu nomiĝis Merkato.

Kaj la popolo murmuris kaj
diris: "Vidu, la akvujo estas
plenplena kaj ni mortas de soifo.
Donu al ni akvon, ke ni ne pereu!"
Sed la posedantoj respondis:

"Tion ni ne povas fari, en la ak-
voprovizon ni plasis grandan par-
ton de nia kapitalo; ni konstru-
igis la cisternon kaj pagis al vi
salajron dum multaj tagoj; nun ni
deziras retroricevi ĉi-ĉion kun
profito; vi ja scias: komerco es-
tas komerco!"

Tamen la posedantoj maltran-
kviliĝis, ĉar la popolo ne aĉetis
akvon kaj ili diris unu al la al-
ia: "Vidu, ŝajnas ke nia profito
haltigis nian profiton kaj, ~~pro~~ *ĉar*
~~ke~~ ni jam faris tiom da profito,
ni nun ne plu povas fari profiton.
Kio kaŭzas, ke nia profito ne plu
estas profitdona? Ni konsultu la

ekspertojn, ke ili klarigu al ni ĉi aferojn, kaj ili venigis ilin.

La ekspertoj estis homoj, kiuj estis tre instruitaj kaj povis kaŝi la veron de la aferoj per multaj orakolaj vortoj. Ili nun prenis partion por la posedantoj (pro la akvo de la posedantoj, ke ili ricevu de ĝi por trinki, ili kaj iliaj infanoj).

Kaj la posedantoj demandis al ili, kio kaŭzas ke la popolo ne plu aĉetas akvon de ili, kvankam la cisterno estas plena.

Kaj kelkaj el la ekspertoj respondis: "La kaŭzo estas la tro granda produktado", sed tion arde kontraŭis aliaj, kiuj diris ke la kaŭzo estas tro malgranda konsumado. Kaj denove aliaj diris, ke makuloj sur la suno estas la kaŭzo, tiel ke la tero troviĝas en malfavora pozicio. Ankoraŭ aliaj diris: "Ĉi-ĉio estas sensenca; la malbono estas kaŭzata de manko je fido."

Kaj dum la ekspertoj, laŭ-
kutime, interdisputis, la viroj
de la profito dormis kaj kiam ili
vekiĝis, ili diris al la eksper-
toj: "Nun sufiĉas, vi konsolis
nin; nun iru ankaŭ al la popolo
kaj parolu al ĝi konsole, ke ĝi
ankaŭ trankviliĝu kaj lasu nin en
paco."

Sed la ekspertoj ne ŝatis
iri al la popolo, ĉar ili ne ĝuis
fidon ĉe ĝi kaj ili diris al la
posedantoj:

"Estroj, la sekreto de nia
arto estas, ke nur tiuj kiuj sat-
as kaj ne havas soifon, povas
trovi konsolon en niaj paroloj.
TIUJ, KIUJ SOIFAS, NE TROVOS RI-
POZON EN NIAJ VORTOJ, KONTRAŬE,
ILI MOKOS NIN, ĈAR ESTAS KVAZAŬ
NIA SAĜECO ŜAJNAS AL ILI VANTA
KAJ SENVALORA, KIAM ILI NE ESTAS
SATAJ."

Sed la koleraĵ posedantoj
diris: "Iru, ĉu ne estas via tas-
ko plenumi tion, kion ni ordonas

al vi?"

Kaj la ekspertoj iris al la popolo kaj klarigis la misteron de la tro granda produktado kaj la kaŭzon de tio, ke ILI DEVIS PEREI PRO SOIFO, ĈAR ESTIS TRO MULTE DA AKVO, kaj kial la popolo ne povis havi sufiĉe, ĉar la provizo estis tro granda! Kaj ankaŭ ili parolis al la popolo pri la makuloj sur la suno kaj pri la manko je fido en la gvidantoj. Sed okazis tiel kiel la ekspertoj antaŭdiris, ĉar la popolo trovis ilian saĝecon vanta kaj senvalora kaj la popolo insultis ilin, elvokante:

"Foriru, kalvuloj, ĉu vi volas moki nin? Ĉu el abundeco povas rezulti malsatego? Ĉu nenio povas deveni el multeco?"

Kaj la posedantoj vidis, ke la popolo ne jam estas kontenta kaj ne fidis la vortojn de la scienculoj, kaj ili timis ke ĝi volu perforte alproprigi al si

la akvon el la cisterno. Tiam ili sendis iujn sanktajn virojn (sed estis falsaj pastroj!), kiuj admonis la popolon ke ĝi estu trankvila kaj ne ĝenu la posedantojn, eĉ se ĝi estas soifa. Kaj tiuj sanktaj viroj, kiuj estis falsaj pastroj, atestis antaŭ la popolo, ke ĉi tiu malfeliĉo estas sendita de Dio por la savo de ĝia animo kaj ke tiu kiu estas pacienca kaj ne murmuras, venos post sia morto en landon, kie estas abundeco de akvo.

Kaj la popolo, kiu ne sufiĉe konis la sanktajn skribaĵojn, kredis tion en sia naiveco.

Tamen estis ankaŭ kelkaj veraj profetoj de Dio kaj tiuj kompatis la popolon. Ili ne volis false atesti por la profito de la posedantoj, sed malfavore juĝis pri ili.

Kiam nun la posedantoj vidis ke la popolo ne jam trankviliĝas, ili mem iris al la popolo. Ili

trempis la fingropintojn en la akvon, kiu transbordiĝis, kaj ĵetis la gutojn inter la popolon kiu svarmis ĉirkaŭ la cisterno. Tiuj gutoj portis la nomon "filantropio" kaj estis tre amaraj.

Kaj pro tiu "filantropio" la posedantoj estis ankaŭ alte laŭdataj.

Dume la popolo ankoraŭ ĉiam soifis kaj ĝi ĉiam pli amasiĝis ĉirkaŭ la cisterno, kvazaŭ ĝi volus perforte preni tiun kaj la posedantoj interkonsiliĝis kaj ili sekrete sendis virojn inter la popolon. Tiuj viroj elserĉis la plej fortajn, kiuj povis plej bone batali kaj ili parolis aparte al tiuj, dirante:

"Kial vi ne kunlaboras kun la posedantoj, kiujn vi ja bezonas? Se vi volas servi ilin kaj malhelpi la popolon konkiri la akvuĵon, tiam vi havos abundecon de akvo kaj nek vi nek viaj infanoj bezonos pere!"

Kaj la fortaj viroj aŭskultis tiujn parolojn kaj lasis persvadi sin, ĉar ankaŭ ili estis navuloj. Ĉu krome la posedantoj ne estis tre bonfaremaj kaj ĉu ili ne celis la bonon de ĉiuj? Ĉu ne ankaŭ la scienculoj parolis tre konvinke kaj montris la pruvon, ke neniu kulpas pri tio, ke estas manko je akvo, malgraŭ la granda abundeco? Do ili lasis persvadi sin kaj la posedantoj donis al ili bastonojn kaj glavojn kaj dum multaj monatoj ili estis ekzercaj por ke ili fariĝu taŭgaj batalantoj en la servo de la posedantoj. Kaj ili skurĝis la popolon kiam ĝi amasiĝis ĉirkaŭ la cisterno, ĉar multaj suferis grandan mizeron. Sed la posedantoj faris fontanojn kaj fiŝlagetojn kaj sin banis en la akvo, ili kun siaj edzinoj kaj infanoj kaj ili ĝin uzis por sia plezuro, tiel ke la akvonivelo ĉiam pli malleviĝis kaj post multaj tagoj la fundo de

la cisterno estis videbla.

Tiam la virojn oni denove dungis por replenigi la akvujojn kaj la homoj diris: "La krizo finiĝis!" Kaj por ĉiu sitelo da akvo, kiun ili verŝis en la cisternon, oni denove pagis po unu penco, sed por ĉiu sitelo, kiun la posedantoj de la cisterno donis al la popolo, po du pencoj devis esti pagataj, ĉar ...oni ja devis fari profiton! Kaj multaj akvoportistoj estis lernintaj saĝajn lecionojn el la preterpasinta krizo kaj ili klopodis ŝpari kelkajn el la pencoj, kiujn ili ricevis pro la akvo verŝita en la cisternon; "ĉar", ili diris, "se ree venos malbonaj tempoj, ni havos ankoraŭ ion por aĉeti akvon", kaj kvankam ili bezonis multe pli por si kaj siaj infanoj, ili estis tre sobraj; ili ankaŭ devis ŝpari por la maljuneco, kiam ili ne plu povus porti sitelojn da akvo kaj ne plu estus dungataj de

la posedantoj. Kaj ĉiuj laŭdis
ilin pro ilia ŝparemo kaj ĉi tiu
estis nomata granda virto. Ĉar la
posedo de multaj pencoj donis po-
tencon kaj estimon!

Sed multaj ne sukcesis kolek-
ti pencojn kaj se ili fariĝis
malsanaj aŭ tiom maljunaj ke la
posedantoj ne plu dungis ilin,
ili mortis pro mizero, ĉar neniu
sin okupis pri ili. Tiel multaj
pereis, kies nomoj ne estis menc-
iataj, ĉar la akvoportistoj estis
grandnombraj kaj ne tre estimataj.
Sed kiam iu el la posedantoj mor-
tis, li estis ĉie glorata pro sia
sagaceco kaj entreprenemo, ĉar li
estis kunlaborinta al la realigo
de la cisterno, pro kiu tiom da
akvoportistoj ne bezonis pereji de
soifo. Kaj li estis pompe enter-
igata kaj la tuta popolo funebris
la bonfarinton de la homaro.

... Kaj pro la alportado de
la akvo, la popolo ricevis por
ĉiu sitelo po unu pencon, sed por

la akvo, kiun la posedantoj donis al la popolo, du pencoj devis esti pagataj.

Kaj post mallonga tempo la akvujo denove estis plenplena, samkiel antaŭe. Ree estis krizo kaj multaj suferis grandan mizeron.

Tio okazis ankoraŭ multfoje.

Kiam nun denove iu krizo estis finita kaj la akvoportistoj ree havis sufiĉan laboron, unu inter ili, kiu superis pro sia granda intelekto, dum multaj tagoj forrestis de la laboro kaj pro tio suferis grandan mizeron.

Sed tion li apenaŭ rimarkis, ĉar lia tuta atenteco estis direktata al granda folio de papero, kiu kuŝis antaŭ li kaj sur kiun li metis kun multaj linioj komplikitan desegnaĵon, kiun neniu povis kompreni. Post semajnoj de streĉita pensado lia projekto estis preta kaj li iris al la posedantoj de la akvujo, al kiuj li

klari
multa
malri
pria
longe
kajn
plano
isto,
kaj
ĝojis
penco
por

la p
no;
tajn
bojn
iris
tubo
man
ese
font
unu
ter
dev

klarigis la tutan planon. La plej multaj iom nekredeme rigardis la malriĉan akvoportiston; kelkaj eĉ priridis lin, sed unu diris mal-longe: "Jen, mi donos al vi kelkajn pencojn, tiam ni provos la planon." Kaj la malriĉa akvoportisto, kiu fakte estis eltrovinto kaj jam suferis tian soifon, ĝojis ke nun li havas kelkajn pencojn kaj povas aĉeti akvon por si kaj sia familio.

Kaj nun venis tempo en kiu la popolo perlaboris multe da mono; ĉar la posedantoj dungis multajn virojn por munti longajn tubojn, kiuj de la fontoj kaj putoj iris al la cisterno; kaj ĉe ĉiu tubo oni metis pumpilon, por kies manovrado nur unu viro estis necesa kaj la akvo fluis rekte de la fontoj kaj putoj en la akvujojn.

Kaj ĉiu posedanto igis munti unu aŭ plurajn tubojn kaj la cisterno (kiu estis nomata Merkato) devis esti multe pligrandigata kaj

tio donis laboron al multaj aliaj
manoj. Kaj ĉie oni laŭdis la nom-
on de la eltrovinto, kiu ... dume
estis mortinta de mizero. Ĉar nur
malmultajn pensojn li ricevis pro
sia eltrovo.

Kaj ĉiam novajn tubojn oni
muntis kaj la akvoprovizo konsta-
nte kreskadis. La posedantoj arde
interbatalis, ĉar ĉiu el ili klo-
podis vendi kiom eble plej multe
da akvo al la popolo, kaj tion
oni nomis konkurenco. Kaj kvankam
ili provis superi unu la alian
kaj, por vendi la akvon al la po-
polo, uzis falsajn informojn kaj
mensogajn komunikojn, oni tamen
laŭdis tiun konkurencon kaj diris
ke ĝi estas nepre necesa por la
nobligo de la komerco.

Sed post mallonga tempo la
posedantoj devis maldungi multajn
el la popolo, ĉar estis tro multe
da akvo. Kaj ĉar ĉiu posedanto
klopodis vendi sian akvoprovizon,
eĉ je malalta prezo tiel ke la

profi
anke
altie
aĉet
akvo
kaj l
krizo
is k
sank
ĉar
kriz
Ĉar
lo e
labo
men
kres
sufe
pose
dis
akvo
okaz
gran
mal
la
mul

profito estis nur tre malgranda,
ankaŭ la salajroj devis esti mal-
altigataj kaj pro tio la popolo
aĉetis ankoraŭ malpli multe da
akvo. Tiel la senlaboreco kreskis
kaj kreskadis kaj ...denove estis
krizo. Kaj la ekspertoj antaŭdir-
is ke ankaŭ ĉi-tiu preterpasos,
samkiel faris ĉiuj antaŭaj krizoj,
ĉar ili ne komprenis ke ĉi tiu
krizo tute ne similis la aliajn.
Ĉar malgraŭ ke multaj el la popo-
lo estis maldungitaj, ne havis
laboron kaj suferis mizeron, ta-
men la akvoprovizo kreskis kaj
kreskis, tiel ke ne finiĝis la
suferado de la popolo. Tiam la
posedantoj kunvenis kaj ili deci-
dis fari netrinkebla parton de la
akvo kaj forfluigi ĝin; kaj tiel
okazis ke oni faris nekonsumebla
grandajn kvantojn de la bona akvo
malgraŭ ke miloj pereis pro soifo.

Sed ankaŭ tio ne helpis. Pro
la granda senlaboreco la plej
multaj ja ne havis monon por aĉe-



DETRUADO

ti a
gi e
enca
ci-t
bald
rata
situ

la k
espe
pri
car
kiu,
ne
estu

kiu,
kal
daŭ
lon
ice
do
pov
miz
ciu
pli

ti akvon, kiel ajn malmultekoste ĝi estu oferata. Kaj ĉar la sciencaj kalvuloj persistis diri ke ĉi-tiu krizo (kiu ne estis krizo) baldaŭ malaperos, nenio estis farata por ĉesigi la netolereblan situacion.

La mizero pligrandiĝis kaj la krimemo kreskis; multaj, senesperigitaj, mortigis sin. Sed pri tio oni skrupule silentis, ĉar la posedantoj kaj la multaj kiuj ankoraŭ estis en ilia servo, ne deziris, ke la vera situacio estu konata.

Tiam aperis kelkaj viroj, kiuj havis pli klaran vidon ol la kalvuloj, kaj diris: "Kial ni daŭrigus tiun mizeron ankoraŭ pli longe? Ĉu ja ne estas pli ol sufiĉe da akvo por ĉiuj homoj? Kio do kaŭzas, ke tiom da homoj ne povas aĉeti ĝin kaj devas suferi mizeron? La kaŭzo estas ke por ĉiu sitelo da akvo vi devas pagi pli multe ol vi mem ricevis por

ĝi. Vi do neniam povas retroaĉeti tion kion vi mem alportis. Do forigu la profiton kaj vi povos akiri tiom da akvo kiom vi deziras, vi kaj viaj edzinoj kaj infanoj."

La kalvuloj, pri kiuj ĉiuj pensis, ke ili posedas grandan saĝecon, avertis la popolon pri la novaj Profetoj, kies vortojn ili nomis kimerio. Kaj la popolo, kiu jam suferis tiom multe kaj longe, estis perdinta ĉiun fidon en pli bona estonteco kaj ĝi aŝkultis kun deturnita kapo.

Sed la veraj Profetoj ne ĉesis kaj ĉiam pli laŭte sonis ilia voĉo, ĉiam pli konvinke ili argumentis, ke la eraro estas en la sistemo de vendo kaj aĉeto kaj ke oni devas forigi la profiton.

Sed la popolo respondis: "Kiel ni povas forigi la profiton se sen ĝi la posedantoj ne volas doni al ni la akvon? Ĉu ne ĉiuj fontoj kaj putoj, ĉiuj pumpiloj

kaj tuboj, ja eĉ la tuta akvujo, estas en la manoj de la posedantoj?" Kaj ree la Profetoj parolis al la popolo, dirante: "La putoj kaj la fontoj ne povas aparteni al la posedantoj, ili apartenas nur al Dio, kaj Dio donis la teron kun ĉio sur ĝi kaj en ĝi al ĉiuj homoj. Kaj la pumpiloj, la tuboj kaj la cisterno, ĉu ne vi faris tiujn propramane? Do ankaŭ tiuj apartenas al la tuta popolo."

Kiam la posedantoj aŭdis tion, ili denove petis la helpon de la ekspertoj kaj falsaj pastroj, sed ties voĉoj perdiĝis en la bruo. Ĉar la nombro de veraj Profetoj kreskis kaj ankaŭ la veraj pastroj de Dio ĉiam pli laŭte aŭdigis siajn voĉojn, dirante: "Fari profiton estas kontraŭ la ordonoj de Dio, ĉar skribita estas: "Amu vian proksimulon kiel vin mem."

Kaj la popolo demandis: "Kion ni devas fari por veni el ĉi tiu mizero?"

Kaj la profetoj diris: "El-
ektu saĝajn virojn por reguladi
viajn devojn kaj fiksadi vian la-
boron; la frukton de via laboro
vi dividus kiel fratoj, ĉiu el vi
ricevos egalan porcion kaj vi ne
bezonos cedi ion de ĝi - en formo
de profito - al la posedantoj.
Tiam la akvo ne transbordiĝos an-
taŭ ol ĉiu el vi estas sata. Kaj
el tio kio restas vi faros belajn
fontanojn kaj lagetojn, samkiel
faris la posedantoj, sed tiam vi
ĉiuj ĝuos de tio!"

Kaj la popolo faris kiel di-
ris la veraj profetoj. Kaj ne plu
estis soifuloj en la lando, nek
malsatuloj kaj neniu suferis mal-
varmecon; neniu plu vivis en miz-
ero; kaj la homoj nomis unu la
alian "frato" kaj vivis en kon-
kordo kaj la beno de Dio kuŝis
por ĉiam sur tiu lando.

Trad.: G.H.B.

INTERNACIA ASOCIO „BELLAMY”
(Centro por Internacia Propagando)

Asocio por disvastigo de la ekonomiaj principoj, kiujn Edward Bellamy ellaboris en siaj du verkoj „Looking Backward” („Rigardante Malantaŭen”) kaj „Equality” („Egaleco”): labordevo por ĉiuj, kontraŭ la rajto je egala porcio de la produktaro. Forigo de la profitsistemo, konkurenco kaj senorda produktado.

Kotizo: Minime f 2.- jare,
aŭ f 1.- duonjare.

Detalajn informojn sendas la sekretario:
Kerkweg 152, Santpoort, (Nederlando).

Legu la libron de Edward Bellamy:
„RIGARDANTE MALANTAŬEN” 1937
(„En la jaro 2000”)

Prezo: broŝurita f 1.50
bindita f 2,25

Alsendo afrankite post pago
je poŝtgira konto 249553.
(P. v. Heyst, Velsen, Nederlando).

La mondproduktado plene sufiĉas por
doni bonfarton al ĉiu individuo. Kial do
ni tolerus la daŭrigon de la nuna mizero?

Egalporcian dividadon de la produktoj
inter ĉiuj membroj de la socio; laborde-
von por ĉiu: jen kion la Bellamyanoj
volas.